# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k68.htm

Precizigo pri Oswicem




Kion ne fari (paĝo 8-a)

Nro 68a Oktobro/decembro de 2005

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**



*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marina Española, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*


**ISSN 1697-6460**


*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras**


*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***nova konto nº 2043-0138-14-090002040-3*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo**: Samideanoj Petro Hernández kaj Tonjo de l' Barrio montras al ni tion, kion oni ne devas fari kun Esperamto (paĝo 8-a).

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Manuel Pankorbo,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Petras Ĉielauskas,
9 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
10 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
11 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
12 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



# Enhavo


Redaktore: Du gravaj precizigoj ............................ 3
Informoj de la prezidanto: Defendo ........................ 4
Dekalogo de maljuna verdulo ................................ 6
Filozofio, kiel negrava asignaturo .......................... 7
Provizoreco ........................................................ 8
Kion ne fari kun Esperanto .................................. 8
Pri la rajto pri religia konfesado ............................ 9
Mi estas ruĝulo! ................................................. 11
La Faraono: ĉapitro 15-a ..................................... 14
ĉapitro 16-a ..................................... 18
Mas ĵus fondiĝis .................................................. 24



Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**


*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Redaktore Du gravaj precizigoj

Mi devas unue precizigi, ke oni eraris asertante, en la artikolo pri Oswicem, ke usonaj soldatoj liberigis tiun morto-kampon starigitan de germanoj en Pollando dum la Dua Mondomilito. Konsultinte historiajn fontojn, mi trovis, ke estis soldatoj de Sovetunio tiuj, kiuj fermis la kampon kaj eksigis la kaptitojn, kiuj ne plu estis mortotaj tie. Bedaŭrinde por ili, ne temis pri usonaj soldatoj, ĉar tio signifus, ke ili vivus poste en la demokratia Federacia Respubliko de Germanio, anstataŭ en la *Demokrata* Germana Respubliko, kiu poste konstruis la **Muron de Honto** por ke neniu povu forlasi la *komunisman paradizon*. Mi dankas kamaradon Lutermanon, kiu atentigis min pri tiu historia eraro, kaj mi per tiu ĉi precizigo korektas ĝin.

Alia precizigo temas pri la kovrilfoto. Tie ni vidas kelkajn samideanojn, kiuj penas alproksimigi Esperanton al maldekstruloj per la foiro de komunistoj jara en Madrido. Kaj mi opinias, ke estas grava eraro tinkturi Esperanton per politika sinteno por tiel vendi ĝin al partianoj de politikaj partioj aŭ simpatiantoj. Esperanto estas multe pli revolucia ol iu ajn ideologio, ĉar ĝi malinkluzivigas neniun kaj nenion. Ĉion oni povas fari per Esperanto, bedaŭrinde eĉ fiaj agoj. Tiel, oni ne devas disvendi ĝian rajton de unuenaskiteco —universalecon de Esperanto— kontraŭ plado da lentoj: simpatio de tiuj, kiuj agnoskas perforton kiel rimedon por atingi sian celon, laŭ sia *sankta libro*, la ***Manifesto de l' Partio Komunisma***.

Kaj pri la miksaĵo, kiun tiuj samideanoj jam faris pri ambaŭ ideoj, ni povas diri kelkajn ne plaĉantajn aferojn, kiujn ni povas dokumenti per retmesaĝoj, artikoloj en ***Sennaciulo*** kaj leteroj de oficialaj instancoj de SAT mem, pri kiuj tiuj *samideanoj* ne estas certe fremdaj. La Sennacieca Asocio Tutmonda ja estas asocio kultura kaj kulturiga por laboristoj, laŭ tio, kion oni povas legi en la unua punkto de ĝia Statuto. El tio, ke *ĝi celas*, interalie, *utiligi Esperanton al la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda*, kelkaj eltiris, ke **SAT estas klasbatala asocio!**, kaj el tiu senprudenta eltiraĵo, plua paŝo irigas al tio, ke *nur maldekstruloj povas esti bonaj anoj de SAT!*, kaj sekve *nur maldekstruloj rajtas aparteni al la asocio*. Venonta paŝo estas decidi tion, kiu estas maldekstra kaj kiu ne, kaj finfine ni venas al forpelo de dekstrulo aŭ nemaldekstrulo de la asocio. Mi mem suferis tiun mutacion en la sino de SAT, kaj kritikoj al misfaraĵoj de Prezidanto de la Plenumkomitato iĝis atakoj al SAT, kaj sekve forpelo pro *perfido al la bono de la kaŭzo*. Tamen, ~~la sola **kaŭzo** de SAT estas **kulturiga** kaj **esperanta**~~. Pro tio, SAT jam mortis, laŭ sia statuto mem. *Requiescat in pacem...*[1] Aŭ ĉu eble ne? Certe ne: **HALE estas tio, kio restas de SAT**. **Dum HALE ekzistas, SAT ekzistas**. Do, mi vokas ĉiujn bonajn SATanojn, ke ili venu en la sinon de HALE por batali cele al tio, ke la celoj de SAT, tiuj celoj niaj, pluvivos.

[1] Latina funebra eldiraĵo, kiu signifas *Ripozu pace*.

# Informoj de la prezidanto

## Defendo



Unue, mi deziras gratuli la Konflikto-Komisionon pro sendo de la akto de akuzo kontraŭ Pina, Jesuo kaj mi.

Estas bone scii kial kvin samideanoj volas ekskludi nin de SAT, ĉar la ebleco defendi nin permesas al ni defendi niajn sintenojn.

Estas logike pensi, ke ni ne konsentas pri tiuj artikoloj, kiuj aperas je ***Kajeroj el la Sudo***, sed ankaŭ ni ne konsentas pri tiuj artikoloj, kiuj aperas en ***Sennaciulo*** (kaj ni ne petas ekstarigon da proceduro pri eksigo pro tiuj artikoloj, kiujn ni ne ŝatas). La artikolojn ni legas kaj diskutas, kaj eĉ ni respondas ĉar la ebleco respondi estas fakto de libereco pri penso kaj dissendo.

La sinteno de la kvin denoncintoj estas multe pli subtila ol konsenti aŭ ne konsenti pri difinitaj artikoloj, ĉar ili antaŭmetas ne malpli ol publika kondamno (kvazaŭ ni estu antaŭ inkvizicia tribunalo) pri difinita politiko. Se ni kondamnas tiun politikon, ni detruas HALEn (ĉar estas fluo da HALEanoj, kiu apogas nin) kaj se ni ne kondamnas, ni estas eksigitaj de SAT.

La kvin denuncintoj ankoraŭ ne komprenis, ke ni vivas en mondo diversa, kaj tiu diverseco estas pri penso, kaj pri tio ni havas alrigardon pri la mondo kaj realo diversa al tiu, de la kvin denuncintoj. Ekzemple:

—Kiam oni petis, ke ni demisiu, ni publikigis en la unua paĝo ilian peton, kiu estis subskribita de tiuj kvin denuncintoj.

—Ni proponis HALEn al ili, sed ili rifuzis la proponon, kaj reciproke ili rifuzis, ke Jesuo de las Heras estu ano de tiu asocio ilia.

Mi opinias, ke tiuj du ekzemploj montras trajton de stilo nia, kaj sekve ni povas labori kune, kun kapablo kritiki, kaj tamen ili nur volas labori aparte.

Surprizinde, la akuzo ne estas klara, ekzemple, *vi diris tion kaj tion ĉi*, sed ĝi estas ĝenerala akuzo: *diru ĉu vi konsentas pri la numeroj 42-a, 48-a, 53-a, 56-a, 62-a, 63-a, 64-a, 65-a de* ***Kajeroj el la Sudo***.

Facile ni povus diri, ke *ni ne konsentas pri la uzado de arabaj ciferoj je la nombrado de la paĝoj de* ***Kajeroj el la Sudo***.

Pri tiu afero, la kvin denuncintoj agas per ĝeneralaj akuzoj, tiel, kiel faŝistoj faras. Alia ekzemplo:

En la tempoj de Franko, estis ĝenerala normo pri publika ordo, kiu estis normo sen jura enhavo. Sekve, iam policisto skoldis paron, kiu praktikis nudismon en dezerta plaĝo, pro *publika malordo*, eĉ se ambaŭ nudistoj ne havis publikon provoki skandale, kaj ankaŭ ili ne estis malordaj.

Mi ne deziras malbonajn interpretojn: mi ne diras, ke tiuj kvin denuncintoj estas faŝistoj, mi akuzas neniun esti faŝisma,

ĉar se ili estu tiel, tiu estu problemo de ili, pri kiel ili celas vivi en mondo diversa kaj kompleksa, kie ne eblas pureco rasisma. Tio, kion mi diras, estas, ke ili uzas totalismajn procedojn tiajn, kiajn uzis en la pasinteco faŝistoj, ŝtalinistoj kaj inkviziciistoj.

Alia afero estas kritikoj al SAT. Evidentiĝas, ke el ***Kajeroj el la Sudo*** oni kritikis SATn, sed la celo ĉiam estis plibonigi ĝin, kaj pro tio ni ne partoprenis aventurojn kontraŭSATajn, kiel TAS, nun MAS.

Kaj laste la temo falangisma.

Oni disŝiras siajn vestojn, plorante kiel ploristinoj tiuj kvin denuncintoj, ĉar ni publikigis artikolon subskribitan de falangisto, sed mi ankoraŭ ne vidis artikolon verkitan de la kvin denuncintoj rifuzante la tezojn de la falangisto, kaj la sola kritiko pri tiu artikolo estis tiu, de la Prezidanto de HALE. Ĉu ĉi tiu prezidanto devas kondamni publike sian propran kritikon pri la tezo falangisma?

Ĉu vere la kvin denuncintoj ne havas argumentojn kritiki la enhavon de la artikolo?

En ***Kajeroj el la Sudo*** publikiĝas multaj artikoloj kun sintenoj diversaj. Mi memoras, ke Isabel Acevedo publikigis artikolon pri nia Intercivitana Milito, kiun mi kontraŭargumentis. Ĉu la prezidanto de HALE ankaŭ devas kondamni tiun artikolon?

La sola akuzo konkreta estas, ke "sur kies paĝoj troviĝas du fotoj: unua de deportito kaj dua de Goebbels. La temo de tiu ĉefartikolo estas kompari Jakvon Schram kaj Goebbels!"

Tio ĉi, kio ŝajnas, dekomence, akuzo konkreta, estas ankaŭ ĝeneraliga kaj manipulacianta, ĉar ĝi ne diras laŭ kiu senco oni komparas. HALE ne komparas Jakvon kun Goebbles pri la amasmurdo de judoj, nek pri provoko la katastrofon de la Dua Mondomilito; sed ĝi estas nur ĵurnalista rimedo por koncentri atenton de la leganto antaŭ konkreta fakto.

La lasta perlo en tiu teksto ŝajnas eltirita el la arĥivo de KGB: *ke la nura rimedo por ke vi restu en SAT estus, ke vi kondamnu publike tiun artikolon, agnosku viajn erarojn kaj ĉesu viajn atakojn kontraŭ SAT.*

Estas mirinde, ĉar ĝi forprenas la maskon demokrateskan de la totalistaj denuncintoj, kaj ni povas nin demandi ĉu ni ankoraŭ estas je la jaroj tridekaj de la lasta jarcento, kiam la pozicioj totalismaj vundis tiom grave progresismajn homojn. Ni ankaŭ povus nin demandi: Kion ajn faras aro da totalistoj en la sino de SAT? Ĉu nun SAT akceptas totalistojn, kiuj lernas faŝismon?

Kaj finante, la peto de la kvin denuncintoj jam preskriptiĝis, ĉar la Konflikto Komisiono malfruiĝis pli ol unu jaron por sendi komunikon pri la akuzo al akuzitoj.

Estante preskriptiĝita la peto pri eksigo, ni petas, ke oni arĥivigu ĝin.

Juan Antonio Cabezos Martinez
Jose Pina Tulles.
Jesuo de las Heras

# Dekalogo de Maljuna verdulo

1 Mi neniam lasos belulinon pasi sen tio, ke mi ne ĝuas la alrigardon. :-)

2 Mi neniam parolos supraĵe aŭ sen-gravigante la gravecon de beleco kaj graco, kaj ĉiam mi apogos ĝin en konversacio, se bezonate.

3 Ĉiam mi havos belecon proksime al mia koro kaj ĉiam mi konstatos, ke ĝi estas tio, kio konservas nin feliĉajn kaj kontentajn, kaj multe da tio igas vivon inda vivi.

4 Mi same promesas, ke mi neniam permesos intelektajn celojn, eĉ se ili estas gravaj, senatentigi min dum netaŭga kvanto da tempo.

5 Mi konservos en mia menso, ke beleco estas spirita afero, ne pli, ne malpli.

6 Mi ĉiam havos puran menson kiam mi rigardos belecon, aŭ, se tion mi ne sukcesas fari, almenaŭ mi ĝuos pen-sante tion, kion mi pensas.

7 Mi memoros, ke vidi estas la sola maniero havi, kiu estas reala. Sekve, tio, kion vi povas vidi, vi povas havi.La kialon por posedi ion estas malebligi aliajn havi ĝin ankaŭ, kaj tio estas sencela.

8 Min ne ĝenos tio, ke ili foriras. Ĉiam estos pli.

9 Mi promesas ĝui vivon kaj tio, kion ĝi donis al mi, kaj reciproke mi apogos vivon kaj estos konstruiva.

10 ne estas deka punkto



# FILOZOFIO, kiel negrava asignaturo



Jam estas obstina kaj ribelema fakto ekde la Transiro Reĝima ke, tuj post la alveno de ĉiu nova estraro, la Ministro pri Klerigado sekvanta sentas la nebrideblan bezonon modifi la klerigsistemon, eble por havi la ŝancon eniri en la historion kiel geniulon renovigintan la klerecon de la novaj generacioj de Hispanio. Al ĝi oni aldonu kvazaŭ neeksplicitan akordon de ĉiuj el ili tiel ke ĉiu nova Studoplano devas konsiderigi bonan sian antaŭan, jen kondiĉo implicita kiun oni plenumas tiel rigore, ke neniu povos nei ke la kleriga damaĝo en Hispanio estas realaĵo evidenta. Sekvante tiun ĉi direkton la Ministrino pri Klerigado esprimis ke en nia lingvo ekzistas multaj « anglikanismoj» (vorto tute nekongrua kun la kunteksto) post adopti la decidon enkonduki la francan en la infanlernejojn kaj forigi la filozofion kiel asignaturon.

Flankenlasante la kritikojn de la plirekte trafitoj, komprenebla aliflanke, eblas diri ke tiu ĉi situacio estis delonge antaŭvidebla, ĉar la filozofio sengraviĝadis ĝis sia definitiva prikonsidero kiel negravan asignaturon, situacio kiun mi opinias fundamentita sur la pluraj jenaj motivoj: 1e sur la merkatisma karaktero de la socio kiun kuraĝigas la ekskluziva sindediĉo de la politikistoj al la kruta I+D (t.e. **esplorado kaj ekonomia evoluo**, laŭ hispana mallongigo); 2e sur la nekompetenteco de la respondeculoj kiuj, alpreninte popolismajn decidojn , opcias al la ŝajne bono je la malutilo de la solida klerigado; 3e ĉar ne estas vero ke la filozofion oni instruis tiel ke la studentoj lernu pensi per si mem , sed kiel listojn de nomoj, datoj, teorioj kaj skoloj kiuj logike enuigis la studentaron; 4e ĉar elstaris pro sia foresto de la amaskomunikiloj la filozofoj je la ŝancoj debati tiujn aferojn kiuj interesas al la socio - milito, alkoholismo, aborto, geedziĝo, terurismo, malsekureco, enmigrado, ktp- jen temoj pri kiuj la filozofoj havas multon por diri. Se Sokrato sin difinis kiel la tabanon de Ateno, ĝi estis ĝuste ĉar la funkcio de pripensisto konsistas el sprono de la socio por teni ĝin aktiva kaj pripensanta.

La filozofio, mi estimas, estas fundamenta ne nur por la gestudentoj sed por la civitanoj ĝenerale, ne ĉar ĝi estas vojo por miregigi ularon, ĉar en tia kazo la rezulto ne kompensus la penon; eĉ ne ĉar ĝi pritraktas la grandajn demandojn de la vivo; eĉ ne ĉar ĝi pripensigas - ankaŭ tion faras la ŝakludo kaj pli distre- sed ĉar la filozofio temas pri la vivo mem, ĝi utilas por disponi de perspektivo antaŭ la kutimaj problemoj, starigas opciojn kaj malsamajn respondojn, kaj ebligas interpreti la realon kaj antaŭvidi la mondan evoluon.

*Jozefo Ludoviko Pérez Óvilo*

# Provizoreco

Laŭ raporto de la sindikato U.G.T. (Uniĝo Ĝenerala de Laboristoj de Hispanio) persentita en la pasinta aŭgusto, la dunga provizoreco atingas en Hispanio indicon rekordan  da 33%, superante, unuafkoje, la nombron de 5 milionoj de provizoraj dungitoj.

Atentu ĉi datumon! Tiu ĉi nombro superas tiun de la provizoraj dungitoj de Italio, Unuiĝinta Reĝolando, Belgio kaj Svedio, ĉiuj kune.

Dum la averaĝa Eŭropo provizoneco estas de 13,6% , en Hispanio ĝi atingis 33% kaj ĝi plu.

Zapatero (ĉefminisro socialdemokrata de Hispanio) ricevis la povon kun 30% de dunga provizoreco 3%-on. Laŭ la datumoj de U.G.T., ekde al 2003-a la nombro de  provizoraj dungitoj kreskis 20%on kaj en la lasta jaro la provizorindeco pliiĝis 2.5 procentajn punktojn.

Estante ankoraŭ proksima la lasta dekstrisma laborreformo, la estraro devas rememori ke unu el siaj defiaj partianaj celoj estis la forigo de la dunga provizoreco. Tamen ĉiuj rimedoj realigitaj ĝis nun ne sukcesos forigi ĝin, sed male, ili permesas ke tio plu kreskos.

En la lasta trimonato 77%on el la neta kreo de salajrataj dungoj oni ŝuldas el la kresko de la provizoreco. Tio estas, kreiĝas pli da dungoj sed nestabilaj. Kion diri pri la promeso de multaj stabilaj kontraktoj kontraŭ la urbaj kontraktoj (nestabilaj)? Kial la eksdungigoj fariĝis pli malmultekostaj?

Daŭringante ĉivojen la laborkondiĉojn de la hispanaro plu estos je la vicofino de Eŭropo, kun provizoreco galopanta; kaj la stabilaj dungoj estigos speco estingiĝanta.

## Kion ne fari kun Esperanto

Mi unue devas konfesi, ke la Prezidanto de HALE malpermesis min tuŝi la temon SATeH en niaj paĝoj, sed pro  tio, ke liberpenso kaj liberredakto al mi gravas multe pli ol mia HALEeco, mi kiel ĉiam metis mian postenon je la dispono de la prezidanto de la asocio, sed tamen libere redaktas la bultenon, aŭ ne plu tion faros mi.

Due, mi konstatas, ke tio, kion kelkaj anoj de SATeH faras, ne estas la plej bona ideo disvastigi Esperanton. Oni povas esti maldekstra, dekstra aŭ senpolitikema, katolika, fanatika, atea, gangstera, porregistara, kontraŭsistema, aŭ tiel plu, sed bonvolu oni ne tinkturu Esperanton per tio. Esperanto estu nur lingvo. Oni ne atribuu Esperanton al frenezuloj de tiu aŭ de tiu ĉi ideo. Esperanto estas bona ideo, sed lingva ideo. La samideanoj de SAT en Hispanio opinias, ke esti maldekstra estas grava afero. Tio havas du sensencajn kaj danĝerajn malbonajn sekvojn: Unue, ili opinias, ke nur maldekstruloj estu en esperantaj asocioj, kiel SAT kaj SATeH. Due —kaj multe pli grava!—, ke normalaj homoj povas pensi, ke nur maldekstruloj rajtas esti esperantistoj, ke Esperanto estas afero de maldekstro, kaj dekstro sekve devas kontraŭstari Esperanton. Sed gravaj homoj kutime ne estas tiuj de maldekstro. Se ni blindigas homojn per tiu parolado de maldekstro, Esperanto restos fremda al etosoj decidopovaj. Ni kontraŭstaru tiun turpan movon de SATeHanoj. Ili jam vundis Esperanton sufiĉe.

# Pri la rajto de religia konfesado

Je la paĝo 151-a de ***Sennaciulo*** n-ro 1205-a aperas interesa artikolo subskribita de Pedro Sanz, kiu enhavas kelkajn gravajn erarojn.

Unue, ĝi taksas ĉi tiun magazinon kiel *liberpensulan magazinon*, anstataŭ *liberpensa* aŭ *liberpensiga*. Sufiĉe granda progreso, ĉu ne?, konstati, ke por kelkaj SATeHanoj ni ne plu estas faŝistoj, sed *nur* liberpensuloj.

Due, ĝi akuzas la registaron socialisman de Jozefo Ludoviko Rodriges Sapatero pri forta subteno de la Katolika Eklezio. La aŭtoro parolas pri tio, ke la Eklezio estas *forte subtenata de la ŝtato, rekte per parto de la impostoj*. Tio estas erariga, ĉar ĝi povas pensigi, ke ĉiuj hispanoj alportas monon al la Eklezio, same kiel ni ĉiuj alportas monon —per impostoj niaj— al konstruado de hospitaloj, aŭtoŝoseoj, lernejoj kaj aliaj rimedoj necesaj por ĉiuj, inkluzivante tiujn impostojn de homoj, kiuj neniam malsaniĝas, havas infanojn aŭ aŭtomobilon. Tion oni povas konsideri *deviga solidareco* fare de la ŝtato, sed mi tion ne kritikas, ĉar ni ĉiuj povas iam havi infanojn, aĉeti aŭton aŭ bedaŭrinde malsaniĝi. Sed venante al *impostoj* por pagi la Katolikan Eklezion, tio limiĝas al 0'5239% de la impostebla enspezoj de individuo, sed kiun oni povas elekti ĉu oni pagu al la Eklezio Katolika ĉu al aliaj *Solidaraj Celoj*, kiu vere estas NeRegistaraj Asocioj. Do, la impostopaganto decidas per si mem ĉu li aŭ ŝi pagas la Eklezion, ĉu ne. La apero pri tiu procento por la Eklezio ŝuldiĝas al la socialisma registaro de Felipe González, kaj ne, sekve, al *la dekstro*. Pri la *pagitaj profesoroj*, pri kiuj Sanz parolas, mi interpretas, ke li celas diri pri la salajroj de la instruistoj pri religio je lernejoj hispanaj, kaj la alporto de la ŝtato al privataj lernejoj en Hispanio. Ne ĉiuj tiuj estas regataj de religiuloj, tamen, do la akuzo ne estas klare justa. Due, la privataj lernejoj en Hispanio, hodiaŭ, kostas al la ŝtato malpli da mono ol tiuj publikaj. Trie, se oni fermus ilin ĉiujn —kiel oni faris dum la Dua Hispana Respubliko—, multaj infanoj ne havus eblecon ĉeesti lernejon, kaj konstitucia rajto al lernado ne ebliĝus por ĉiuj. Sed se Sanz referencus al salajroj de tiuj instruistoj pri religio je publikaj lernejoj en Hispanio, tiuj instruistoj, kiujn elektas la episkopoj koncernaj, sed kies salajron pagas la ŝtato, ni konstatu, ke ekzistas —ankoraŭ— Konkordato, tio estas, interkonsento, inter Hispanio kaj la Sankta Sidejo de la Papo pri tio. Ne fari tion estus rompi internacian interkonsenton, kaj tio povus havi malbonajn sekvojn por Hispanio. Tamen, en tiuj klasoj oni ne rekte instruas pri religiaj aferoj, sed pri ĉiutagaj aferoj el vidpunkto de religio. Ĉu religio estu parto de la ĝenerala kulturo de niaj infanoj? Nu, se oni ne konas pri io, oni povas facile mensogi al ni pri tio, kion oni ne konas. Mi, kiel ateisto, opinias, ke la plej bona maniero per kiu oni ne povas sukcese mensogi al oni pri religio estas, ke oni konu religion.

Fine, mi vidas la malĝojon, per kiu Sanz parolas pri Federiko Ĥimenes Losantos kaj ***Kajeroj el la Sudo***. Ankoraŭ la tiel konsiderataj maldekstruloj de SATeH ne

sukcesis diri eĉ unu sukcesan argumenton pri iu ajn asertoj de tiu radia raportisto aŭ de ***Kajeroj el la Sudo***. Ili nur scias dogmigi, kondamni, ataki sen dialogi, kaj mensogi.

En tiu sama paĝo de mi referencita, oni resumas la plej gravan misfaraĵon de SAT en sia historio per tiu komuniko:

***Afero Jesuo de las Heras***

—[La Konflikto Komisiono] *Memorigas, ke jam la plimulto de la antaŭa KK, la Plenum-Komitato plurfoje kaj la 78-a Kongreso en du okazoj pritraktis la aferon «Jesuo de las Heras» kaj decidis fine eksigon sen limdato de S-ro De las Heras.*

—*Deklaras nericeveblaj ĉiujn plendojn de aŭ kontraŭ S-ro Jesús de las Heras Jiménez, nemembro de SAT.*

Nu, kion diri? La Konflikto Komisiono eraras unufoje pli, kaj ankaŭ, pro tio, ke mi ne povas supozi nekonon al ili, denove mensogas malbonintence, ĉar je la momento, kiam mi prezentis plendon kontraŭ Marteno Bustin' kaj Jakvo Schram, mi estis membro de SAT, kaj *tiu plendo*, sekve estas plendo de membro de SAT, eĉ se mi ne plu estas membro. Do, eksmembrigi min kontraŭstatute kaj kontraŭ plej baza justeco kaj logiko ne senvalidigas mian plendon. La Plenumkomitato kaj la Konfliktokomisiono de SAT povas tordi siajn proprajn leĝojn por pravigi stelulan Prezidinton de SAT, sed ili ne eblas tordi realon sen iĝi la moko de la tuta esperantistaro.

Ili ankaŭ diras, ke mi atakas SAT per artikoloj en numeroj 42-a, 48-a, 49-a, 50-a, 53-a, 56-a, 62-a, 63-a, 64-a kaj 65-a, sed ĉiu nemensehandikatpita homo ne malfacile trovas, ke tiuj artikoloj diras eĉ ne unu vorton kontraŭ SAT, sed kontraŭ la misfaroj de Jakvo Schram kaj kelkaj aliaj apartaj homoj, kiuj apartenas al SAT, sed ne kontraŭ SAT mem. Nun, ke mi konstatas, ke la anaro de SAT havas nenion diri kontraŭ tio, ke la Statuto de SAT estas perfortita favore al la persona prefero de individuo, mi komencos akre paroli pri SAT. Tamen..., ĉu tio utilas? Ĉu utilas diri ion kontraŭ —aŭ eĉ favore— al kadavro? SAT estis iom valora tiam, kiam Ivo Peyrault gvidis ĝin. Tiam oni ne kuraĝus kontraŭi ties Statuton. Nun la Statuto de SAT estas io, kio ornamas kunvenojn kaj etoson kvazaŭ laborismaj, kiuj parolas pri io, kio iam estis *klasbatalo*, sed kio ne plu realas, ĉar proletaroj burĝiĝis pli-malpli. De kiam proletaroj estis konsumistoj, la klasbatalo ĉesis esti realebla, kaj la politika celo de SAT vaporiĝis. Tamen, la iamaj proletaroj — tio estas, la aro da homoj, kiuj havis nur sian geidaron— jam posedas aferojn, kiujn iam nur riĉulojn posedis, kiel ĉarojn (aŭtojn), palacojn (domojn) aŭ nefaron (ferion), do ili havas gravajn aferojn perdi, se revolucio perforta okazas. Sekve ĝi ne plu eblas. Sekve, ankaŭ ili —vere ni ĉiuj— ankaŭ iĝis la sistemon. Do la nuna diskurso de la moratinta SAT jam elĉerpiĝis, kaj nur restas la vera kerno de la animo de SAT: kulturiĝo de la iama klaso laborista. Do, oni ne plu mensogu al si mem: oni forlasu SATn kaj aliĝu HALEn, la sola asocion, kiu ankoraŭ havas la fundamentan animon de la fondinta SAT en Prago je 1922.

# Mi estas ruĝulo! (kaj kun du ovoj[1])

Mi estas ruĝulo. Mi estas ruĝulo, de antaŭ mi naskiĝis. Kial? Nu, estas du gravaj kialoj, kiuj ankaŭ estas objektivaj: mia sango estas tute ruĝa, kaj ankaŭ mia koro estas, kaj ĉiam estis, je mia maldekstro.

De ĉiam mi opiniis, ke ĉiu homo havas rajton al sia propra eldiro, eĉ se erara. Eĉ se manka. Eĉ se turpa. Eĉ se —mi kuraĝu diri— fia. Ĉefe pro tio, ke mi —eble arogante— ĉiam pensis, ke mi povos pensi kaj repensi pri tiuj argumentoj metitaj antaŭ min, kaj mi finfine povos trovi pli bonan argumenton, kiu pruvu, ke la mondo apartenas al ĉiu homo, ne sole al tiuj, kiuj posedas ideologion, ĉu religian, ĉu politikan, ĉu malferman, ĉu subgrundan. Kaj mi fiere povas aserti, ke ĝis la momento, mi ĉiam sukcesas. Sed se mi iam malsukcesas, mi certe trovos tiun trezoron, kiun ideologiisto diras, ke li aŭ ŝi posedas!

Antaŭ kelkaj tagoj, mi legis en tiu mirinda dissendolisto, Esperanto-en-Hispanio, al kiu devus aliĝi ĉiu esperantisto kun retaliro en la mondo, ne sole hispana, ĉar ĝin plenplenas humuro kaj esperantismo. Se oni vidus ĝin el ekstere, oni eble povas obĵeti al kelkaj el la diraĵoj, sed se oni scias, ke temas nur pri eta aro da amikoj, oni povas kompreni, ke okazas nur klopodo de humuraj homoj, kiuj deziras vivigi la liston. Bedaŭrinde, kelkaj el ili listanoj ne sufiĉe bone regas nian belan kaj klaran lingvon, kaj pli ofte ol dezirinde falas en la hispanan por dubesence uzi kelkajn vortojn, en sia senĉesa serĉo da humuro kaj bontempopasigado...

Nur tiel oni povas kompreni tiun mesaĝon, de nia ekskamarado —eksa nur pro tio, ke mi ne plu sukcesis malbarigi mian eniron en SAT—, S-ro Petro Hernández, el Madrido. Ni relegu kelkajn el la perlojn de li dediĉitajn al mia humila persono:

> De: Pedro Hernandez <esperanto@mi.madritel.es>
> Responder a: esperanto-en-hispanio@yahoogroups.com
> Para: esperanto-en-hispanio@yahoogroups.com
> Asunto: Re: [esperanto-en-hispanio] CURSO DE ESPERANTO
> Fecha: Wed, 12 Oct 2005 13:03:36 +0200
>
> Jesueto, ne estas bezonate, ke vi pruvu, ke via intelekta nivelo estas ŝualta, ĉar ni ĉiuj jam scias tion. Aldone, mi ne scias, ĉu vi jam rimarkis, ke ĉi tiu listo ne plu funkcias ĉar la ceteraj partoprenantoj estas ĝis la ovoj pri viaj stultaĵoj kaj insultoj.
>
> Evidente, la hispana esperantista movado fartus multe pli bone se vi dediĉus vin al Volapük aŭ Ido, ĉar via ĉeesto en forumo kiel ĉi tiu estas la plej bona afero por tio, ke tiu, kiu komencas studi la lingvon kaj montru sian nazon ĉi tie, decidu ne plu scii iam ajn pri lingvo parolata de elkora menshandikapulo kiel vi.
>
> Vi dediĉu vin al viaj falangoj kaj patrigloroj kaj malaperu, la Esperanto movado dankos vin eterne. Kaj se tio, kion vi ŝatas estas fiki aliulojn, vi plej bone iru en seksovendejon kaj aĉetu tion, kion vi volos por solumi.
>
> Ni devus repensi krei novan forumon, sed kun «aktiva» prizorganto, por eviti la ĉeesto de idiotoj kiel vi.
>
> Putriĝu,
>
> Petro.

Nu, al tiuj, kiuj ne konas Petron, ne estos evidenta la humuraĵon, ĉar li vere estas bonkora homo, kiu neniam eĉ revus

[1]*medole, aŭ ĝisoste*, tio estas, *esence.*

insulti homojn, multe malpli esperantiston. Sed oni devas vivigi la liston, kaj li vere perfortis sian naturan ĉarman emon, kaj li produktis tiun majstroverkon da cinikeco kaj humuro.

Certe, estas alia mesaĝo de iu Davido, el Malago, kiu kaŝiĝis sin sub la nomo *Jesuo me la Pelas*, kaj diris tion:

De: Jesuo Me la Pelas <tumburil@gmail.com>
Responder a: esperanto-en-hispanio@yahoogroups.com
Para: esperanto-en-hispanio@yahoogroups.com
Asunto: Re: [esperanto-en-hispanio] CURSO DE ESPERANTO
Fecha: Wed, 12 Oct 2005 11:28:19 +0200

Okazas, ke vi estas ovtuŝulo perfekta, kaj fojfoje vi ŝajnas pli stulta ol Ĥesulín de Ubrike [fama taŭristo]. Ĉu vi ne povus, same kiel ĉiuj faŝistoj, resti spektante la armeoparadon levante vian brakon, kvazaŭ vi haltigu taksion? Pri kio temas via agado, krom fikigi ĉiujn kaj ĉien?

Vi povus instrui kurson por marsanoj kiel vi, anstataŭ insulti ĉiujn aliajn.

Saluton neniel elkoraj,

David el Malago

Oni rimarku la vortoludon inter «marsano» kaj «mursjano», kiu estas pli proksima en la hispana (*marciano* kaj *murciano*). Mi ege ridis pri tio. ☺ Mi ne komprenas, tamen, la rilato inter faŝistoj kaj mi, kiun ekskamarado Davido volas starigi. Tio paligas, certe, sian humuraĵon. Sed espereble li klarigos tion iam en la dissendolisto.

Mi ne povas diri, ke mi ne kontribuis al tiu blagado, ĉar certe mi respondis al serioza mesaĝo de S-ro Petro Hernández, per kiu li sciigis al ni pri tiu kurso de li instruata nun en Madrido, kaj pri kiu mi sincere esperas sukceson, per iomete ŝercema paragrafo:

De: Jesuo de las Heras <jheras1@aliso.pntic.mec.es>
Responder a: esperanto-en-hispanio@yahoogroups.com
Para: esperanto-en-hispanio@yahoogroups.com
Asunto: [esperanto-en-hispanio] CURSO DE ESPERANTO
Fecha: Wed, 12 Oct 2005 11:13:38 +0200

Merkrede, je la 2/10/2005 09:46, Petro Hernández diris:


>La kurso, kiun mi estas instruonta, >komencas ĉi tiun sabaton je la 11:00 horo, kaj > daŭrigos ĉiun sabaton ĝis Kristnasko, laŭ tio, >kion ni decidis... Klasoj okazos en >Librovendejo Muga, c/Pablo Neruda, 89 >(Vallecas)....

Vi ne diris ĉu ĝi estas nur por ruĝuloj, aŭ se aliaj ankaŭ povas iri. Ĉar povas okazi, ke vi eksigu ilin aŭ peti, ke oni forprenu ilin laŭ dekreto, same kiel vi (kaj amikoj) faris en SAT pri tiuj, kiuj ne konsentas pri viaj dubesencaj ideoj.

Elkorajn salutojn,

Jesuo de las Heras.

Jes, mi povas kompreni, ke ne ĉiuj homoj sindetenis tiom dure, je la momento esprimi humuron, same kiel mi, ĉar mi uzis nek falsan nomon, nek insultojn. Sed certe ni hispanoj scias, ke tio estas humuraĵo hispana, kiu multe ridigas nin je niaj hejmoj, eĉ se ni devas klarigi pri tio publike, honore al eksterlandanoj, kiuj komprenas ne tre bone nian apartan humursenton.☺



Venontfoje, ni parolos pri la Litova Kongreso.

# La faraono

*ĈAPITRO 15ª*

En la sekvinta tago Ramzes sendis sian Negron kun ordonoj Memfison, kaj ĉirkaŭ la tagmezo de la urbo venis granda barko al la bieno de Sara. Ĝi estis plena de grekaj soldatoj en altaj kaskoj kaj brilantaj kirasoj.

Laŭ komando dek ses homoj, armitaj per ŝildoj kaj mallongaj lancoj, surbordiĝis kaj stariĝis en du vicojn. Ili jam estis marŝontaj al la domo de Sara, kiam haltigis ilin alia sendito de l' princo. Li ordonis al la soldatoj resti sur la bordo kaj alvokis nur ilian estron, Patroklon, al la kronprinco.



La soldatoj haltis kaj staris senmovaj kiel du vicoj da kolonoj, kovritaj per brilanta lado. Post la sendito iris Patroklo en kasko kun plumoj kaj purpura tuniko, sur kiu li havis oran armaĵon, ornamitan sur la brusto per virina kapo, sur kiu anstataŭ haroj leviĝis serpentoj.

La princo akceptis la eminentan generalon en la pordego de l' ĝardeno. Li ne ridetis, kiel ordinare, eĉ ne respondis al la profunda kliniĝo de Patroklo, sed diris kun malvarma mieno:

—Diru via ekscelenco al la grekaj soldatoj de miaj regimentoj, ke mi ne ekzercos ilin, ĝis lia sankteco ne nomos min duan fojon ilia estro. Ili perdis ĉi tiun honoron, drinkuloj, kies krioj ofendas min. Mi turnas ankaŭ vian atenton al tio, ke la grekaj regimentoj ne estas sufiĉe disciplinitaj. En publikaj lokoj la soldatoj de ĉi tiu korpuso diskutas pri politiko, nome pri ia ebla milito, kaj tio estas kvazaŭ perfido de l' ŝtato. Pri tiaj aferoj povas paroli nur la sankteco la faraono kaj la membroj de la plej alta konsilantaro. Kaj ni, la soldatoj kaj servistoj de nia sinjoro, povas nur plenumi la ordonojn de nia plej grandanima estro kaj ĉiam silenti. Mi petas, ke via ekscelenco komuniku miajn rimarkojn al miaj regimentoj kaj mi deziras al vi ĉiajn sukcesojn.

—Estos, kiel vi diris, via ekscelenco — respondis la Greko. Li sin turnis sur la kalkano kaj rekta kiel lanco iris kun tinto de l' armaĵo al sia ŝipeto.

Li sciis pri la disputoj de la soldatoj en la drinkejoj, kaj li komprenis nun, ke ia malagrablaĵo okazis al la kronprinco, kiun la armeo adoris.

Kiam do li atingis la areton da armitoj, starantaj sur la bordo, li faris tre koleran mienon kaj furioze svingante la manojn, diris:

—Bravaj grekaj soldatoj!... favaj hundoj, la lepro vin manĝu!... Se de nun, iu Greko elparolos en drinkejo la nomon de l' kronprinco, mi rompos la kruĉon sur lia kapo, kaj la pecojn mi ŝovos en lian gorĝon kaj —for el la regimento! Vi paŝtos porkojn ĉe la egipta kamparano, kaj en via kasko la kokinoj metos ovojn. Tia sorto atendas la malsaĝajn soldatojn, kiuj ne scias haltigi sian langon; kaj nun maldekstren, malantaŭen kaj marŝu al la barko, la pesto vin!... La soldato de la faraono devas antaŭ ĉio trinki por la sano de la faraono kaj por la prospero de lia ekscelenco Herhor, la milita ministro. Ili vivu eterne!...

—Eterne ili vivu!...— respondis la soldatoj.

Ĉiuj sidiĝis malgajaj en la barko. Sed apud Memfiso la frunto de Patroklo sereniĝis kaj li ordonis kanti pri la pastra filino, kiu tiel amis la armeon, ke ŝi metis pupon en sian liton, kaj tutajn noktojn pasigis en la budeto de la gardsoldatoj.

Ĉe la ritmo de ĉi tiu kanto oni plej bone marŝis kaj plej vigle remis.

Ĉirkaŭ la vespero al la bieno de Sara albordiĝis alia ŝipeto, el kiu eliris la ĉefa intendanto de la bienoj de Ramzes.

Ankaŭ ĉi tiun altrangulon la princo akceptis en la pordego de l' ĝardeno. Eble pro severeco, eble por ne devigi lin eniri en la domon de sia konkubino kaj Hebreino.

—Mi volis— diris la princo —vidi vin kaj diri, ke inter miaj kamparanoj rondiras maldecaj babiladoj pri malgrandigo de la impostoj, aŭ pri io simila... Mi deziras, ke la kamparanoj eksciu, ke mi ne malgrandigos al ili la impostojn. Kaj se iu, malgraŭ la avertoj, obstinos en sia malsaĝo kaj diskutos pri la impostoj, li ricevos bastonadon....

—Eble pli bone estos, se li pagos punon... unu utenon aŭ draĥmon, kiel ordonos via ekscelenco— proponis la intendanto.

—Bone; sed oni povas doni bastonadon al la plej ribelaj.

—Mi kuraĝas rimarkigi al via ekscelenco— murmuretis la intendanto, kiu restis klinita —ke la kamparanoj efektive dum iom da tempo parolis pri la nuligo de la impostoj, ribeligitaj per iu fremdulo. Sed de kelke da tagoj ili eksilentis...

—En tia okazo la bastonado estas superflua —diris Ramzes.

—Eble por antaŭgardo?... —intermetis la intendanto.

—Ĉu tio ne estos malŝparo de l' bastonoj?

—Ĉi tiu komercaĵo neniam mankas al ni...

—En ĉiu okazo... modere— admonis la princo. —Mi ne volas, ke atingu la orelojn de lia sankteco, ke mi senbezone turmentas la kamparanojn... Pro ribelaj babiladoj oni devas bati kaj monpuni, sed se estas neniu kaŭzo, oni povas esti grandanima.

—Mi komprenas— respondis la intendanto, fikse rigardante la okulojn de l' princo. —Ili kriu tiom, kiom estas necese, por ke ili ne murmuretu blasfemojn.

Ĉi tiuj du paroladoj, de Patroklo kaj de l' intendanto, trakuris la tutan Egipton.

Post la foriro de la intendanto, la princo oscedis kaj ĉirkaŭrigardante per enuaj okuloj, li diris al si mem:

—Mi faris, kion mi povis. Kaj nun mi faros nenion, se tio estos ebla al mi.

En ĉi tiu momento, de la bienaj konstruaĵoj venis al la princo mallaŭta ĝemo kaj rapidaj batoj. Ramzes turnis la kapon kaj ekvidis, ke Ezeĥiel, filo de Ruben, batas per bastono unu el siaj subuloj kaj samtempe trankviligas lin:



—Kaj silentu!... silentu, vi malnobla bruto!

La batata terlaboristo, kuŝante sur la tero, ŝtopis sian buŝon por ne krii.

La princo, en la unua momento, sin ĵetis kiel pantero al la konstruaĵoj Subite li haltis.

—Kion mi faros al li?... —murmuretis li. —La bienoj ja apartenas al Sara, kaj ĉi tiu Hebreo estas ŝia parenco...

Li mordis la lipojn kaj sin kaŝis inter la arboj; cetere la ekzekuto jam estis finita.

—Jen kiel administras la humilaj Hebreoj!... —pensis la princo.

—Min ili rigardas kiel timigita hundo, kaj la laboristojn ili batas? Ĉu ili ĉiuj estas tiaj?..

Kaj la unuan fojon vekiĝis en la animo de Ramzes suspekto, ke eble ankaŭ Sara kaŝas malsincerecon sub la ŝajna boneco.

En Sara efektive fariĝis ŝanĝoj, precipe moralaj.

De la unua momento, kiam ŝi renkontis la princon en la dezerta valo, li plaĉis al ŝi. Sed ĉi tiu sento subite eksilentis sub la influo de la surdiganta sciigo, ke ĉi tiu bela knabo estas la filo de l' faraono kaj la heredanto de l' trono. Kaj kiam Tutmozis interkonsentis kun Gedeono pri ŝia transloĝigo en la domon de l' kronprinco, Sara duone perdis la konscion.

Por ĉiuj trezoroj de l' mondo, por la prezo de l' vivo ŝi ne forlasus lin, sed oni ne povis diri, ke ŝi amis lin en tiu epoko. La amo bezonas liberecon kaj tempon por doni siajn plej belajn florojn, kaj al ŝi oni lasis nek tempon, nek liberecon. En la sekvinta tago, post kiam ŝi ekkonis la princon, oni forrabis ŝin, preskaŭ ne demandante ŝian konsenton, kaj transportis en la domon apud Memfiso. Kaj post kelke da tagoj ŝi farigis amatino, mirigita, terurita, ne komprenante, kio okazas al ŝi.

Krom tio, ŝi ne havis ankoraŭ sufiĉe da tempo por kutimi al la novaj impresoj, kiam ektimigis ŝin la malbonvolo de la najbaraj kamparanoj kontraŭ ŝi, kontraŭ Hebreino, poste la vizito de fremdaj sinjorinoj, fine la atako kontraŭ la bieno.

La fakto, ke Ramzes stariĝis ĉe sia flanko kaj volis sin ĵeti kontraŭ la atakantoj, ankoraŭ pli multe timigis ŝin. Ŝi perdis la konscion ĉe la penso, ke ŝi estas en la manoj de tiel malmodera kaj potenca sinjoro, kiu, se tio plaĉis al li, havis la rajton verŝi la sangon de aliaj, mortigi...

Sara momenton malesperis; ŝajnis al ŝi, ke ŝi freneziĝos, ŝi aŭdis la minacajn ordonojn de l' princo, kiu alvokis la servistojn al la armiloj... Sed en la sama momento okazis bagatelo, unu vorto, kiu rekonsciigis Saran kaj donis novan direkton al ŝiaj pensoj.

La princo pensante, ke ŝi estas vundita, forŝiris la bandaĝon de ŝia frunto, sed rimarkinte la kontuzon, ekkriis:

—Tio estas nur kontuzo?... Kiel ĝi aliigas la vizaĝon!... Ĉe tiu ĉi vorto Sara forgesis la doloron kaj timon. Nova maltrankvilo ekregis ŝin: ŝi do tiel aliiĝis, ke tio mirigis la princon?... Li nur ekmiris!...

La kontuzo malaperis post kelke da tagoj, sed en la animo de Sara restis kaj grandiĝis novaj, nekonataj sentoj. Ŝi komencis esti ĵaluza pri Ramzes kaj timis, ke li forlasos ŝin.

Alia ĉagreno ŝin turmentis: en lia ĉeesto ŝi sentis sin servistino kaj sklavino. Ŝi estis kaj volis esti lia plej fidela servistino, lia plej sindona sklavino, ne forlasanta lin kiel ombro. Sed samtempe ŝi deziris, ke almenaŭ dum la karesoj li ne agu kun ŝi kiel sinjoro kaj estro.

Ŝi ja estis lia, kaj li ŝia. Kial do li ne montras, ke li apartenas al ŝi almenaŭ iom, sed pruvas per ĉiu vorto kaj movo, ke senfundaĵo disigas ilin?... Kia?... Ĉu ŝi ne tenis lin en siaj brakoj? Ĉu li ne kisis ŝian buŝon kaj bruston?...



Foje venis al ŝi la princo kun hundo. Li restis nur kelke da horoj, sed la tutan tempon la hundo kuŝis ĉe la piedoj de l' princo, en la loko de Sara, kaj kiam ŝi volis sidiĝi tie, ĝi komencis murmuri... kaj la princo ridis kaj same dronigis siajn fingrojn en la haregoj de la malpura besto, kiel en ŝiaj haroj. Kaj same la hundo rigardis la okulojn de l' princo, eble kun la sola diferenco, ke ĝi rigardis pli kuraĝe, ol ŝi.

Ŝi ne povis trankviliĝi kaj ekmalamis la saĝan beston, kiu forprenis al ŝi parton da karesoj, tute ne zorgante pri ili kaj kondutante en la ĉeesto de la sinjoro tiel senĝene, kiel ŝi neniam kuraĝus. Ŝi eĉ ne povus havi tiel indiferentan mienon, nek rigardi flanken, kiam sur ŝia kapo kuŝis la mano de l' kronprinco.

Antaŭ nelonge la princo ree parolis pri dancistinoj. Sara eksplodis:

—Kiel? Li do lasus sin karesi de tiuj virinoj nudaj, senhontaj?... Kaj Jehovo, vidante ĉi tion de la alta ĉielo, ne ĵetus tondron sur la monstrajn virinojn?...

Vere, Ramzes diris, ke ŝi estas al li pli kara ol ĉiuj. Sed liaj vortoj ne trankviligis

Saran; ili havis nur tiun efikon, ke ŝi decidis pensi pri nenio, ekster sia amo.

Kio okazos morgaŭ?... tio ne estas grava. Kaj kiam ĉe la piedoj de l' princo ŝi kantis pri la ĉagrenoj, kiuj persekutas la homan genton de la lulilo ĝis la morto, ŝi esprimis per sia kanto la staton de sia propra animo kaj sian lastan esperon — en Dio.

Hodiaŭ Ramzes estas apud ŝi, tio sufiĉas: ŝi havas ĉiujn feliĉojn, kiujn povas doni la vivo. Sed ĝuste tie komenciĝis por Sara la plej granda ĉagreno.

La princo vivis kun ŝi sub la sama tegmento, li promenis kun ŝi en la ĝardeno, iafoje prenis ŝin en la ŝipeton kaj veturigis sur Nilo. Sed li fariĝis neniom pli proksima ol tiam, kiam li estis trans la rivero, en la reĝa parko.



Li estis kun ŝi, sed pensis pri io alia, kaj Sara eĉ ne povis diveni, pri kio? Li ĉirkaŭprenis ŝin, aŭ ludis kun ŝiaj haroj, sed li rigardis al Memfiso, aŭ la grandegajn multkolorajn kolonojn de la faraona kastelo, aŭ —oni ne scias kien.

Iafoje li eĉ ne respondis ŝiajn demandojn, aŭ subite ekrigardis ŝin kvazaŭ vekita, kvazaŭ mirante, ke li vidas ŝin apud si.

***CAPITRO 16ª***

Tiaj estis la horoj —cetere sufiĉe maloftaj —de la plej granda proksimiĝo inter Sara kaj sia princa amato. Doninte la ordonojn al Patroklo kaj al la ĉefa intendanto, la kronprinco pasigis la plej grandan parton de la tago ekster la bieno, ordinare en la ŝipeto. Kaj, veturante sur Nilo li per reto kaptis fiŝojn, kiuj en miloj ludis en la benita rivero, aŭ li iris al la marĉo, kaj tie kaŝita inter la altaj lotusaj trunkoj li arkpafis la sovaĝajn birdojn, kies kriemaj bandoj rondflugis multenombre kiel musoj. Sed eĉ tiam ne forlasis lin la ambiciaj pensoj; li faris al ŝi el la ĉasado kabalon au antaŭdiran rimedon. Multfoje, vidante aron de flavaj anseroj sur la akvo, li streĉis la arkon kaj diris:

—Se mi trafos, mi estos iam kiel Ramzes Granda...

La sago mallaŭte ekfajfis kaj la trapikita birdo, svingante la flugilojn, kriis tiel dolorplene, ke la tuta marĉo ekmoviĝis. Nuboj de anseroj, anasoj kaj cikonioj leviĝis kaj strekinte grandan rondon super la mortanta kamarado, falis sur alian lokon.

Kiam ĉio jam estis silenta, la princo singarde puŝis la ŝipeton en alian lokon;

gvidis lin la sanceligo de la kanoj kaj la interrompataj voĉoj de l' birdoj. Kaj kiam inter la verdaĵo li rimarkis tukon de klara akvo kaj novan aron, li ree streĉis la arkon kaj diris:


—Se mi trafos, mi estos faraono... Se ne...

Sed la sago ĉi tiun fojon ekbatis la akvon kaj resaltinte kelke da fojoj de ĝia supraĵo, malaperis inter la lotusoj. Kaj la princo, regata de la pasio, sendis novajn kaj novajn sagojn, mortigante birdojn aŭ nur fortimigante ilin. En la bieno oni povis ekkoni, kie li estas, per la krioj de la birdoj, kiuj ĉiumomente leviĝis kaj rondflugis super lia ŝipeto.

Kiam ĉirkaŭ la vespero li revenis laca hejmen, Sara jam atendis ce la sojlo kun kuvo da akvo, kruĉo da malforta vino kaj rozaj kronoj. La princo ridetis al ŝi, karesis ŝian vizaĝon, sed rigardante ŝiajn okulojn, plenajn de amo, pensis:

—Mi dezirus scii, ĉu ŝi batus la egiptajn kamparanojn, kiel siaj ĉiam timigitaj parencoj?... oh, mia patrino estas prava, ke ŝi ne konfidas al Hebreoj, kvankam Sara eble estas alia!...

Foje reveninte neatendita, li ekvidis en la korto antaŭ la domo grandan areton da nudaj infanoj, kiuj gaje ludis. Ĉiuj estis flavaj kaj rimarkinte lin diskuris kun krioj, kiel la sovaĝaj anseroj de l' marĉo... Li ankoraŭ ne atingis la terason de la domo, kiam ili jam malaperis, eĉ ne lasinte postsignon.



—Kio ili estas, ĉi tiuj malgrandaj estaĵoj —demandis li Saran —kiuj forkuras de mi?

—Tio estas la infanoj de viaj servistoj —respondis ŝi.

—De Hebreoj?

—De miaj fratoj...

—Dioj! Kiel multobligema estas tiu ĉi popolo! —ridis la princo.

—Kaj kiu estas ĉi tiu?... —aldonis li, montrante homon, kiu time elrigardis trans la muro.

—Tio estas Aod, filo de Baruĥ, mia parenco... Li volas servi al vi, sinjoro. Ĉu mi povas akcepti lin?...

La princo levis la sultrojn.

—La bieno estas via —respondis li —vi povas akcepti, kiun vi volas. Sed, se ĉi tiuj homoj tiel multobligos, baldaŭ ili invados Memfison.

—Vi malamas miajn fratojn?... —murmuretis Sara, time rigardante Ramzeson kaj glitante al liaj piedoj.

La princo surprizita ekrigardis ŝin.

—Mi eĉ ne pensas pri ili —respondis li fiere.

Ĉi tiuj bagatelaj okazoj, kiuj falis en fajraj gutoj sur la animon de Sara, ne ŝanĝis por si Ramzeson. Li ĉiam estis same bonvola kaj karesis ŝin kiel ordinare, kvankam liaj okuloj pli kaj pli ofte kuris al la alia bordo de Nilo kaj haltis ĉe la potencaj pilonoj de la kastelo.

Baldaŭ li rimarkis, ke ne sole li sopiras en sia propravola ekzilo. Foje de la alia bordo forveturis ornamita reĝa barko, transpasis Nilon kaj komencis rondiri tiel proksime de la bieno, ke Ramzes povis rekoni la personojn, sidantajn tie.



Li rekonis sub la purpura baldakeno sian patrinon inter du kortegaj sinjorinoj, kaj kontraŭ si, sur malalta benko, la ministron Herhoron. Kvankam ili ne rigardis la bienon, la princo divenis, ke ili vidas lin.

—Ah! —pensis li, ridante. —Mia respektinda patrino kaj lia ekscelenco la ministro dezirus forlogi min de tie ĉi antaŭ la reveno de lia sankteco.

Venis la monato Tobi, la fino de oktobro kaj la komenco de novembro. Nilo malleviĝis gis la kresko de unu homo kaj duono, malkovrante ciutage novajn pecojn de nigra, slima tero. Ĉie, kie la akvo defluis, tuj aperis mallarĝa plugilo, tirata de du bovoj. Post ĝi iris nuda plugisto, apud la bovoj veturigisto kun mallonga vipo kaj post li semisto, kiu vadante en la slimo ĝis la kalkanoj, portis en la antaŭtuko tritikon kaj ĵetis plenmanojn da ĝi.

Komenciĝis la plej bela sezono por Egipto —la vintro. La varmo ne superis 15 gradojn, la tero baldaŭ kovrigis de smeralda verdaĵo, kiun superstaris narcisoj kaj violoj. Ilia odoro estis pli kaj pli sentebla inter la krudaj odoroj de la tero kaj akvo.

Jam kelke da fojoj la ŝipo, portanta la respektindan patrinon kaj la vic-regon Herhoron aperis proksime de la logejo de Sara. Ĉiufoje la princo vidis sian patrinon, gaje parolantan kun la ministro kaj konvinkiĝis, ke ili intence ne rigardas al li por montri al li sian malŝaton.

—Atendu! —murmuris la kolera princo —mi pruvos al vi, ke ankaŭ mi ne enuas...

Kiam do foje, malmulte antaŭ la subiro de l' suno, aperis apud la alia bordo la orita reĝa sipo, kies purpuran tendon ornamis en la anguloj strutaj plumoj, Ramzes ordonis prepari ŝipeton por du personoj kaj diris al Sara, ke li promenos kun ŝi.

—Jehovo! —ekkriis ŝi, kunmetante la manojn. —Tie ja estas via patrino kaj la ministro!

—Kaj ĉi tie estos la kronprinco. Prenu vian harpon Sara.

—Ankaŭ la harpon?... —demandis ŝi tremetante. —Kaj se via respektinda

patrino volos paroli kun vi?... Nenio plu restos al mi, ol ĵeti min en la akvon!...

—Ne estu infano —respondis li. —Sara, lia ekscelenco kaj mia patrino tre amas la kanton. Vi do povas akiri ilian favoron, se vi kantos ian belan hebrean kanton. Gi estu pri la amo.

—Tian mi ne konas —respondis Sara, en kiu la vortoj de l' princo vekis la kuraĝon. Eble efektive ŝia kanto plaĉos al la potencaj estroj, kaj tiam?...

Sur la reĝa ŝipo oni rimarkis, ke la kronprinco sidiĝas en simplan ŝipeton, eĉ ke li mem remas.

—Ĉu via ekscelenco vidas —murmuretis la reĝino al la ministro —ke li direktas al mi ŝian sipeton kun la Hebreino?...

—La kronprinco kondutis tiel korekte kun siaj soldatoj kaj kamparanoj kaj montris tian pentemon, forirante el la limoj de la palaco, ke via reĝina moŝto povas pardoni al li ĉi tiun malgrandan kulpon —respondis la ministro.

—Oh, se ne li sidus en ĉi tiu konko, mi ordonus ĝin rompi! —diris kolere la reĝino.

—Por kio? —demandis la ministro. —La princo ne estus posteulo de l' ĉefepiskopoj kaj faraonoj, se li ne penus disŝiri la bridon, kiun, ho ve, surmetas al li la leĝo, aŭ niaj, eble eraraj, moroj. En ĉiu okazo li scias ekregi sin. Li eĉ scias konfesi siajn proprajn kulpojn, kaj tio estas eco malofta, kaj ĉe kronprinco netaksebla.

La fakto mem, ke la princo volas inciti nin per sia favoratino, pruvas, ke doloras lin la malfavoro, en kiu li estas, cetere pro plej noblaj motivoj.

—Sed ĉi tiu Hebreino?... —murmuretis Nikotris, ĉifante la pluman ventumilon.

—Hodiaŭ mi jam estas tute trankvila pri ŝi —diris la ministro. —Ŝi estas bela, sed iom malsaĝa kreaĵo, kiu tute ne intencas, kiu ne scius ekspluati sian influon al la princo. Ŝi ne akceptas donacojn, fermita en sia ne tro multekosta kaĝo si eĉ vidas neniun. Kun la tempo eble ŝi ellernus profiti la situacion de la princa amatino kaj eble malriĉigus la trezoron de la kronprinco je deko da talentoj. Sed antaŭe ŝi tedos Ramzeson.

—Amon ĉioscia parolu per via buŝo!

—Mi estas tute certa. La princo eĉ unu momenton ne amis ŝin freneze, kiel tio okazas al niaj sinjoridoj, al kiuj unu sola lerta intrigantino povas rabi riĉaĵon, sanon, eĉ alkonduki ilin en la tribunalon. La princo amuziĝas kun ŝi, kiel homo matura ludas kun sklavino. Cetere Sara estas graveda...

—Ĉu efektive?... —ekkriis Nikotris. —De kie vi scias tion?...

—Kion scias nek la kronprinco, nek Sara mem?... —ridetis Herhor.

—Ni devas scii ĉion. Cetere ĉi tiun sekreton ne estis malfacile malkovri. Ce Sara estas sia parencino Tafet, virino senkompare babilema.

—Ĉu ili jam alvokis kuraciston?...

—Mi ripetas, ke Sara ne scias pri tio, kaj la bona Tafet, timante, ke la princon eble tedos sia edukitino, volonte tordus la kolon al la sekreto. Sed ni ne permesos. Tio ja estos princa infano.

—Kaj se ĝi estos filo?... Vi scias, ke li povus kaŭzi embarasojn... —interrompis la reĝino.

—Ĉio estas antaŭvidita —diris la pastro.—Se naskiĝos filino, ni donos al ŝi doton kaj edukos sin, kiel konvenas al fraŭlino de alta gento. Se tio estos filo, li fariĝos Hebreo!...

—Ah!, mia nepo Hebreo!...

—Ne rifuzu al li tro frue vian koron. Niaj senditoj sciigas al ni, ke la hebrea popolo komencas deziri reĝon. Antaŭ kiam la infano grandiĝos, iliaj deziroj maturiĝos, kaj tiam... ni donos al ili monarĥon kaj vere de bela sango!....

—Vi estas kiel aglo, kiu per unu ekrigardo ĉirkaŭprenas la orienton kaj okcidenton... —respondis la regino, rigardante la ministron kun admiro. —Mi sentas, ke mia abomeno al tiu knabino komencas malfortiĝi.

—Plej malgranda guto de la sango de l' faraonoj devas leviĝi super la popoloj, kiel stelo super la tero —diris Herhor.

En ĉi tiu momento la ŝipeto de l' kronprinco estis kelkdekon da paŝoj de la reĝa barko, kaj la edzino de l' faraono, sin kovrinte per la ventumilo, rigardis Saran tra la plumoj.

—Vere, si estas bela!... —murmuretis ŝi.

—Jam duan fojon vi tion diras, sinjorino.

—Vi scias eĉ pri tio?... —diris la reĝino ridetante.

Herhor mallevis la okulojn.

Sur la ŝipeto eksonis la harpo kaj Sara komencis per tremanta voĉo himnon:

*—Kiel granda estas la Sinjoro, kiel granda estas la Sinjoro, Via Dio, ho Izraelo!...*

—Belega voĉo!... —murmuretis la reĝino.

La granda pastro aŭskultis atente.

*—Liaj tagoj ne havas komencon —*kantis Sara *—kaj Lia domo ne havas limojn.*
*Sub Lia rigardo la eternaj cieloj aliigas kiel vestoj, kiujn la homo surmetas kaj forĵetas.*
*La steloj ekbrulas kaj estingiĝas, kiel la fajreroj el malmola ligno, kaj la tero estas kiel briko, kiun pasanto unu fojon tusis per la piedo, irante ĉiam antaŭen.*
*Kiel granda estas Via Dio, ho Izraelo.*
*Ne ekzistas tiu, kiu dirus al Li: » Faru ĉi tion! « nek seno, kiu Lin naskis.*
*Li faris la senlimajn profundegajojn, super kiuj Li fluas, kien Li volas.*
*Li el la mallumo eligas la lumon, kaj el la tera polvo —la kreajojn havantajn voĉojn.*
*Por Li la kruelaj leonoj estas kiel la akridoj, la grandega elefanto estas nenio, kaj la baleno estas apud Li, kiel suĉinfano.*
*Lia trikolora arko dividas la ĉielon en du partojn kaj sin apogas sur la ekstremoj de l' tero.*
*Kie estas pordego, kiu egalus Lian grandecon?*
*Ĉe la tondro de Lia veturilo la popoloj falas de teruro, kaj ne ekzistas estajo sub la ĉielo, kiu povus kontraŭstari Liajn brilantajn sagojn.*
*Lia spiro estas la norda vento, kiu refresiĝas la svenintajn arbojn, kaj Lia blovo estas la hamsino, kiu bruligas la teron.*
*Kiam li etendas la manon super la akvoj, la akvo ŝtonigas.*
*Li transversas la maron en novan lokon, kiel la virino la acidon en la vazon.*
*Li disŝiras la teron, kvazaŭ putrintan tolon, kaj la nudajn suprojn de l' montoj kovras per la arĝenta neĝo.*
*Li en la tritika grajno kasas cent aliajn kaj vekas la birdojn en la ovoj.*
*Li el dormema krizalido eligas la oran papilion, kaj al la homaj korpoj ordonas atendi en la tomboj la revivigon...*

Aŭskultante la kanton, la remistoj levis la ilojn kaj la purpura ŝipo malrapide fluis kun la rivero. Subite Herhor ekkriis:

—Turnu al Memfiso.

La remiloj profundigis, la sipo turnigis sur la loko kaj kun bruo komencis levigi kontrau la fluo. Postkuris gin iom post iom eksilentanta kanto de Sara:

*—Li vidas la movojn de la koro de l' raupo kaj la kasitajn vojetojn, sur kiuj iras la plej izolita homa penso.*
*Sed ne ekzistas tiu, kiu al Li povus rigardi en la koron kaj diveni Liajn intencojn.*
*Antau la brilo de Liaj vestoj la grandaj spiritoj kovras siajn vizagojn.*
*Antaŭ Lia rigardo la dioj de l' potencaj urboj kaj popoloj tordigas kaj sekigas kiel velkinta folio.*
*Li estas la forto, Li estas la vivo, Li estas la sago, Li Via Sinjoro, Via Dio, ho Izraelo!...*

—Kial via ekscelenco ordonis forpuŝi nian ŝipon? —demandis la respektinda Nikotris.

—Cu vi scias, kia kanto gi estas?... —respondis Herhor en lingvo komprenebla nur por la pastroj. —Ĉi tiu malŝaga knabino, sur la mezo de Nilo kantas la preĝon, kiun oni povas diri nur en la plej sekreta sanktujo de niaj temploj.

—Tio do estas blasfemo?...

—Feliĉe, sur ĉi tiu sipo estas nur unu pastro —diris la ministro. —Mi tion ne aŭdis, kaj eĉ se mi aŭdus, mi forgesos. Sed mi timas, ĉu la dioj ne metos sian pezan manon sur ĉi tiun knabinon.

—Sed de kie ŝi scias ci tiun teruran preĝon?... Ramzes ja ne povis instrui ŝin?...

—La princo ne estas kulpa. Sed ne forgesu, ke Hebreoj pli ol unu tian trezoron elportis el nia Egipto. Kaj tial inter ĉiuj popoloj de l' tero ni rigardis ilin kiel malpiulojn.

La reĝino prenis la pastron je la mano.

—Sed al mia filo —diris si rigardante liajn okulojn —okazos nenio malbona?...


—Mi garantias, ke al neniu okazos io malbona, mi ne aŭdis, mi scias nenion. Sed oni devas disigi ilin —la princon kaj la Hebreinon.

—Delikate disigi!... —ĉu ne vere, vic-reĝo? —demandis la patrino.

—Plej delikate, plej nerimarkeble, sed oni devas... Sajnis al mi —diris la ĉefepiskopo kvazaŭ al si mem —ke mi antaŭvidis ĉion... Ĉion, esceptinte proceson pri blasfemo, kiu apud ĉi tiu stranga virino pendas super la kronprinco!...

Herhor ekmeditis kaj aldonis:

—Jes, reĝino! Oni povas ridi diversajn niajn superstiĉojn: tamen estas vero, ke la filo de l' faraono ne devas kuniĝi kun Hebreino.



Venas el paĝo 24-a

protektante la planedon Tero por estontaj generacioj.

MAS estas permanenta Monda ASEMBLEO. Ĝi laboras ekskluzive per retpoŝto, ne postulas membrokotizon, estas sen piramidecaj strukturoj - havas nek estraron nek prezidanton nek konfliktkomisionon ktp, do, ĉiuj membroj decidas rekte mem, laŭ la principoj de rekta (aŭ baza) demokratio, kaj ĝi estas perfekte «travidebla» - do, nenia diskuto, decido aŭ faro estas kaŝita al iu membro.

Ĉiu membro rajtas reprezenti la asocion surbaze de ĝiaj statuto kaj decidoj.

Rigardu en ĝian retpaĝon: http://mas-eo.org.

Tie vi trovas ne nur informojn pri MAS mem, sed ankaŭ interesajn artikolojn pri aktualaj sociaj kaj politikaj demandoj.

MAS vokas vin: Homoj, kiuj ŝatus kunlabori en la bazdemokratia asocio MAS, kaj pensas, ke ili havas la saman celon kiel ni, kaj tial volas fortigi nian asocion per siaj ideoj kaj agadoj, estos al ni tre bonvenaj. Ni ne povas havi tro da memkonsciaj membroj, kiuj kun ni volas elprovi novan vojon de memorganizado de Esperanta asocio.

MAS estas neniel konkurenco por aliaj organizoj, ne povas esti io tia, ĉar la celoj de MAS ne estas grupegoismaj. MAS estas malferma por ĉia laŭstatuta kunlaboro, kaj laŭ la statuto eĉ estas devigata al tio. Ni bezonas ĉiun, kiu subtenas niajn celojn. Samtempa agado de niaj membroj en aliaj organizoj por ni ne estas malhelpo, sed riĉigo.

Ni estas konsciaj pri tio, ke nia statuta celo estas afero, kiu bezonas longan spiron. Monda socio sen klasoj, sen militoj, kaj kun laŭhomara ekonomio estas granda celo, kompreneble ne atingebla post tri jaroj. Per ĝia fondo kaj eklaborado ni metis nun la fundamenton por organizo, en kiu la individuo denove povas esperi ne esti la ludilo por aliaj. Ĉe MAS neniu havas «la potencon» kaj neniu havos ĝin, ĉar laŭ lau ĝia strukturo —fiksita en la statuto— tio ne eblas. Tial ĉiu, kiu volas ne esti ŝafo por iu alia, ne havas kialon por maltrankviliĝi aliĝante al MAS - ni volas elprovi novspecan organizon, kiu estas vivtenata ne per burokrata maŝino, sed rekte de la membroj mem.

Por ke ĉiu kaj precipe ankaŭ malriĉuloj povu partopreni, ni postulas neniun membrokotizon. Sed ni akceptas monodonacojn, de tiu kiu povas helpi nin per mono. Ni uzu do la okazon de tiu nova memorganizado de esperantistoj. Se vi estas esperantisto, kiu havas ideojn kaj energion kaj sencon por justeco, se vi estas optimisto kaj pensas, ke vi havas ion por diri, nepre aliĝu al MAS. MAS vokas vin!

*Vilhelmo Lutermano*

**Le Monde diplomatique** en Esperanto http://eo.mondediplo.com



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO

Tfn° (00 34) 658 166 323

Retskribu al jesuo@ono.com

http://213.172.47.3/gazetoteko/kajeroj/k68.htm

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k68.htm

# MAS, la Monda Asembleo Socia, ĵus fondiĝis



La 2-an de aŭgusto, post kvinmonata reta diskutado, interkonsentiĝo kaj fina aprobo de sia fundamento (statuto, Oftaj Demandoj kaj regularo pri aliĝoj), MAS, la MONDA ASEMBLEO SOCIA, oficiale fondiĝis. Jen cetere sufiĉe unika maniero fondi asocion - kaj ankaŭ sufiĉe interesa, ĉar ĝi ebligis senurĝe kaj ĝisfunde pridiskuti la fundamenton de la asocio kaj interkonsentiĝi pri ĝi - ĝi estis fakte la unua paŝo de nova vojo de mem-organiziĝo de asocio, kies ecoj estas same novaj.

Kio estas MAS? La tutmonda organizo de ĉiuj homoj kiuj ne nur konvinkiĝis ke pli bona mondo eblas, sed kiuj pretas kune diskuti kaj agi por realigi ĝin. Ili agas por la monda paco, defendas la interesojn de la tuta homaro kaj klopodas por evoluigi —komencante ĉe si mem— eksternacian pens- kaj ag-manieron home solidaran. Ili strebas kontribui al starigo de mondvaste senklasa socio sen ekspluatado, socio kiu respektas la dignon de siaj membroj sen distingo de aĝo, haŭtkoloro, sekso, seksa orientiĝo, etna aŭ nacia aparteno kaj kredo —socio, kiu organizas sian ekonomion laŭ la bezonoj de ĉiuj siaj membroj,

Daŭrigas je paĝo antaŭa

Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.

ISSN 1697-6460